# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 212 APRILO 2002**

La numero : 2 euroj Abono: 7 € Kotizo: 3 € Sume: 10 €

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



## Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président-*La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| *Ikonografio* | 6 |
| *En nia Asocio* -Agadraporto | 9 |
| Kalendaro | 12 |
| Aliĝilo de la 55-a IKUE kongreso | 13 |
| Artikolo | 14 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 15 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- [ ] Adresse insuffisante
- [ ] N'habite pas à l'adresse
- [ ] Refusé
- [ ] Autres


Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Ikono de Sankta Nikolao kaj siaj mirakloj
(Pierre Hachet,Atelier St-Nicolas des Lorrains)
Vidu artikolon en la bulteno.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 15.a de junio 2002. Venonta bulteno aperos fine de marto.

Finpresado la 26/04/2002

***FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO***

**Nro 212 Aprilo 2002**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen
Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro HEROUX
Maison St-Joseph
26400 ALLEX
Peranto IKUE:
S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL
<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com

# Le mot du Président

"Au matin les oiseaux s'envolent, mais le soir ils retournent au nid " affirme un proverbe congolais.

Les hommes sont semblables aux oiseaux. Dans la journée ils sont loin de leur foyer, mais au soir la famille se recompose et la réunion de tous ses membres lui donne cohésion et unité, tant le cercle de famille facilite les échanges et forge peu à peu les liens affectifs et durable qui soudent parents et enfants dans une union harmonieuse et solide des cœurs et des esprits.

Certes il arrive un moment où les enfants devenus adultes aspirent à prendre leur liberté. Celle ci est souhaitable car il faut que les enfants sachent , le moment venu , lâcher le cocon familial et vivre leur propre existence . Mais cela ne les empêche pas, bien au contraire, de revenir se ressourcer au sein de la famille pour la plus grande joie de tous ses membres.

Il en est de même au plan religieux. Beaucoup de jeunes chrétiens emportés par le tourbillon de la société moderne, qui cultive l'indifférence voire l'hostilité à l'égard du spirituel et du religieux, abandonne la pratique religieuse et semblent s'éloigner pour toujours de l'Eglise.

Mais l'expérience montre que très souvent cet éloignement n'est que temporaire. L'esprit reste à l'œuvre en eux et un jour ou l'autre ils rentrent à nouveau dans son giron, après avoir réfléchi et très souvent mûri leur foi. Le nombre de ceux, que l'on nomme maintenant les recommençants ne cesse de croître et d'apporter à leur retour l'essor d'une ferveur nouvelle, gage de renouveau et de progression pour l'ensemble des fidèles.

Nous avons parfois trop tendance à penser que Dieu est mort et avec Lui la foi chrétienne. Dieu n'est pas mort. Il est vivant et ne cesse de nous appeler à Lui avec amour et confiance . Alors ne cédons pas au découragement ; l'Eglise reste le nid accueillant où Dieu attend ses oisillons et où Il ouvre ses bras paternels à tous ceux qui veulent revenir à Lui.

# La bileto de la prezidanto

"Matene la birdoj ekflugas, sed vespere ili revenas en la nidon" asertas kongolanda proverbo.

Homoj similas birdojn. Dum la tago ili staras malproksime de sia hejmo, sed vespere la familio rekonstruiĝas; la reunuiĝo de ĉiuj ĝiaj membroj alportas al ĝi koherecon kaj unuecon, ĉar familia rondo faciligas interkonojn kaj forĝas amemajn kaj daŭrajn ligilojn, kiuj unuigas gapatrojn kaj gefilojn en harmonia kaj firma unuiĝo de la koroj kaj de la spiritoj.

Tutcerte okazas momento, kie la gefiloj, jam plenkreskaj, arde deziras ricevi sian liberecon. Tiu ĉi estas dezirinda, ĉar necesas, ke, kiam venas la tempo , la gefiloj forlasas la familian kokonon kaj ekvivas sian propran vivon. Sed tio ne malhelpas ilin, tutmale, reveni por refortiĝi en la familia medio por la plej granda ĝojo de ĉiuj el iliaj membroj.

Estas same ĉe la religia flanko. Multaj junaj kristanoj, forrabitaj per la kirlovento de la moderna vivo, kiu laŭdas la seninteresiĝon, eĉ la malamikecon, rilate la spirita kaj religia pensmaniero; ili ŝajnas por ĉiam malproksimiĝi de la Eklezio.

Sed sperto indikas, ke tre ofte tiu malproksimiĝo estas nur nedaŭra. La Spirito agas en ili kaj iutage ili revenas en ĝia sino, post reflekto kaj, tre ofte, maturiĝo de sia Fido. Kiuj oni nomas rekomencantoj, tiuj estas pli kaj pli multnombraj kaj alportas je sia reveno la impeton de nova fervoro, promeso de renoviĝo kaj progreso por la fideluraro.

Ni kelkfoje emas opinii, ke Dio mortis kaj kun Li la kristana Fido; Dio ne mortis; Li vivas kaj ne ĉesas ame kaj kunfide voki al Li. Do ni ne senkuraĝiĝu; Eklezio restas la gastigema nido, kie Dio atendas siajn birdetojn kaj Li malfermas tie siajn patrajn brakojn al ĉiuj, kiuj deziras reveni al Li.

## MEDITADO

Kiam en la kaliko la akvo miksiĝas kun la vino, tiam la popolo fariĝas unu kun Kristo: kaj la kredantaro kunligiĝas en Tiu, en kiu ĝi kredas.

Neniu povas apartigi tiun unuiĝon, tiun kunligon de la akvo kune kun la vino, miksigitaj en la kaliko de la Sinjoro. Tiel nenio povas apartigi la Eklezion, tio estas la popolo starigita en Eklezio, kiu fidela, firme persistas en sia fido al Kristo, al kiu ĝi senĉese aliĝas farante nur unu kun Li en la amo.

Konsekrante la kalikon de la Sinjoro, oni ne povas oferti la akvon sola nek oferti la vinon, sola: ĉar , se oni ofertas nur la vinon, la sango de Kristo ĉeestas sen ni. Kaj se la akvo estas sola, la popolo ĉeestas sen Kristo . Sed se ili ambaŭ estas miksitaj, kunligitaj unu al la alia reciproke, tiamaniere ke ili konfuziĝas en la unueco, tiam plenumiĝas la spirita kaj dia mistero. Tial la kaliko de la Sinjoro ne plu estas la akvo sola aŭ la vino sola ne miksitaj unu al la alia reciproke, kiel ankaŭ la korpo de la Sinjoro ne povas esti la faruno sola aŭ la akvo sola, sen ke unu kaj la alia estus intermiksigitaj, kunligitaj kaj kunmetitaj en unuo por formi la paston de unusola pano.

Per tiu sakramento mem estas figurata la komunio en la unueco de la popolo, kiun ni estas: same kiel multpluraj greneroj kunmetitaj, muelitaj kaj intermiksitaj kune formas solan panon, tiel en Kristo, kiu estas la ĉiela pano, ni sciu bone, ke estas unu Lia korpo al kiu la multego, kiun ni estas, troviĝas unuigita kaj kunligita.

S-ta Cipriano el Kartago (3a jarcento).

## LA ATELIERO de SANKTA NIKOLAO de LORENO.

Kial tiu nomo ?

Sankta Nikolao , la miraklofaristo, estas sen kontesto la plej bildigita sanktulo en la kristana mondo. Ikonoj, pentraĵoj, skulptaĵoj, mozaikoj, ne ekzistas iu arta fako sen figuraĵojn de S-ta Nikolao. Sed estas la ikonografia tradicio kiu estas al li plej fidela. La nombro de ikonoj en la ortodoksa mondo kiu reprezentas sian vivon kaj siajn miraklojn estas nekalkulebla. Oni devas diri ke la okcidentaj kristanoj, la katolikoj ,kiuj perdis la sakralecon de ikonoj, honoris S.N. per multnombraj figuroj kaj nomigis multajn parokojn per la nomo de tiu sanktulo.
Loreno estas la nura regiono de Francio, kiu havas relikvon de S-ta Nikolao . Unu fingro alportita de Bari (Italio) de Aubert de Varongeville en 1090 . Pro tio li estas la patrono de Loreno. Tial, kiam lorena grupo de ikonografoj serĉis nomon por la kreita ateliero, ili senhezite elektis Sankta Nikolao.

Kial krei Ateliero de ikonoj ?

La ikono estas sakra heredaĵo de kristaneco . Tio datumas de la tempo de Kristo, la Enkarniĝo de Kristo malvalidis la leĝo de Mozeo (Deuteronomme 5-8), kiu malpermesis reprezenti homojn aŭ bestojn pro timo de idolkulto.

La dia naturo estas neesprimebla, nekomunikebla, nevidebla . Sed tamen oni povas lice reprezenti la homan naturon de Kristo tio, kio iniciatis ikonografion. Estas Sankta Luka kiu unufoje ikonigis la bildon de la Virgulino laŭ la tradicio.
La unuatempa Eklezio tradukis la tekstojn per bildoj por ke la plej multnombraj kredantoj povu imagi ĉar dum tiu epoko multaj estis analfabetaj.
Tamen la Eklezio restis viglecatenta pri la fideleco de la bildo kompare kun la sakraj tekstoj por eviti herezecon . Tio restis ĉefa principo de ikonografio.
Malgraŭ multaj eventoj dum la jarcentoj, kiel la ikonoklasta cent-jara krizo, la ikonoj disvolviĝis en oriento kaj en slavaj landoj. La Koncilio de Niceo II en 887 ,kiu unuigis la orientaj kaj okcidentaj eklezioj kreis la regularoj por ikonografio ,kiuj estas validaj ankoraŭ nuntempe.
La granda Skismo de 1054 disigis la orientajn kaj latinajn ekleziojn kun granda bedaŭro . La ortodoksaj eklezioj konservis la riĉecon de la ikonoj, kun siaj spiritoj ,sakreco kaj sia didakteco por la kredo . Inverse la roma eklezio seninteresiĝis kaj la papoj subtenis la religian arton ofte tre impona, sed sen sakraleco de la ikonoj.
Nuntempe la okcidentaj eklezioj reekvidas la ikonojn, sed ofte ne komprenas la sakralecon,

heredaĵon de dumil jaroj !
"L' Atelier de St-Nicolas des Lorrains" celas helpi okcidentajn kredantojn por retrovi la mondo de la ikonoj. La membroj serioze lernas dum pluraj jaroj multajn spertojn kaj sciojn pri ikonoj . Ili povas uzi bibliotekon kun pli ol 200 libroj pri ikonografio.
Ikonografio estas kiel apostolato oni bezonas persistemon, sciavidan spiriton , kaj ĝi kreskigas la psikajn kaj moralajn ekvilibrojn. Ĝi instigas al spiriteco, konfortas kredon pere de ikonoj.
Ĉiuj membroj de la asocio estis instruitaj de S-ino Eva Vlavianos, grek-ortodoksa ; ŝi instruas ikonografion en diversaj lokoj de Francio kaj eksterlane. Sed la ĉefa evento kreita de la Ateliero estas la "Biennale des Icones" (la lasta 5-a estis en Nancy) .
Konatigi la ikonojn, naskigi alvokiĝon al ikonografio, jen la celoj de "l'Atelier Saint-Nicolas des Lorrains".
3, Rue Kléber 54000 NANCY .



Icône copte éthiopienne d'après un original du 18è siècle (Françoise BEHE)

## AGADRAPORTO POR LA JARO 2001

La ĉefa punkto de nia agado dum la jaro 2001 estis nia pilgrimo en Lisieux de la 4-a ĝis la 8-a de majo; ĝi okazis en Foyer Louis et Zélie Martin, kie monahinoj akceptis nin en varma frata etoso. Pastro Girault prelegis pri S-ta Tereza en esperanto kaj ni kune vizitis la lokojn, kie S-ta Tereza vivis. La lastan tagon, ekskurso kondukis nin al kastelo St-Germain de Livet, bela renesanca konstruaĵo meze de agrabla parko kaj al la urbo Honfleur, antikva marhaveno.
Sanĝoj okazis en la komitato: F-ino Hervier anstataùis F-ton Marmou kaj S-ro Pons fariĝis IKUE-peranto anstataù S-ro Colleu.
Okaze de la nacia kongreso en Limoges, s-ro Pons organizis tie kongresan diservon, kiun celebris P° Girault.
Grava enketo estis plenumita inter niaj anoj por ekscii iliajn dezirojn pri niaj kongresoj kaj renkontiĝoj. La plej multaj deziras ĝeneralan kunvenon en la nacia kongreso kaj kongreson tre proksime al tiu-ĉi. La asocio studos la aferon.
Nia asocio petis sian aliĝon al Esperanto-France sed je la fino de la jaro ankoraù ne ricevis respondon.
Kiel jam farita dum la pasinta jaro, nia asocio reklamis en la revuoj "Franca Esperantisto" kaj "Le Monde de l'Esperanto", kio alportis novajn anojn.

Dank'al S-ino Lerouge kaj S-ro Colleu oni eldonis libreton en esperanto pri la Rozario. S-ro Bessière helpis en la redaktado de esperanta teksto prezentanta la diocezo Evry sur Interreto.
Je la fino de la jaro 2001, nia asocio nombris 126 membrojn, do 3 malpli ol en la jaro 2000.

## EN NIA ASOCIO

Novaj membroj:

- S-ino CHARTON Corine (Bouches du Rhone)
- S-ro FABRE André (Pyrénées Atlantiques)
- S-ro LE BARS Jean-Jacques (Loire Atlantique)
- S-ro LACROIX Jacques (Corrèze)
- S-ro REDON Marcel (Moselle)

Bonvenon al la genovuloj.

Donacis monon: S-ro ANGEVIN .
Bonfaranto 2002:
S-ro LECOCQ , S-ino LAFARGUE , S-ino GILLES.
Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

**FINANCA RAPORTO 2001**

| ENSPEZOJ | FF | € | ELSPEZOJ | FF | € |
|---|---|---|---|---|---|
| Kotizoj | 6466,94 | 985,88 | Bulteno | 1283,30 | 195,64 |
| Donacoj | 559,98 | 85,37 | Donacoj | 1500,00 | 228,67 |
| Rentumo sparkaso | 0,00 | 0,00 | Korespondado | 3393,15 | 517,28 |
| Kongresaj aligiloj | 278,20 | 42,41 | Komitatkunvenoj | 1528,06 | 232,95 |
| Kongreso | 11170,00 | 1702,86 | Kongreso | 6577,00 | 1002,66 |
| Libro eldonado | 45,00 | 6,86 | Libro eldonado | 0,00 | 0,00 |
| | | | Posta takso | 10,50 | 1,60 |
| SUMO | 18520,12 | 2823,38 | SUMO | 14292,01 | 2178,80 |
| En la kaso 01/01/2001 | 22300,03 | 3399,66 | En sparkaso | 12877,92 | 1963,23 |
| Positiva Saldo | 4228,11 | 644,57 | En P.C.K. | 13650,22 | 2081,00 |
| En la kaso 31/12/2001 | 26528,14 | 4044,23 | | 26528,14 | 4044,23 |

# KALENDARO

## 2002

| | |
|---|---|
| 17/05 ĝis 20/05 | STRASBOURG: Franca Nacia Kongreso Kunveno de nia asocio Diservo en esperanto |
| 20/07 ĝis 27/07 | Kromeriz (Ĉehio) 55a IKUE Kongreso Vidu anoncon en aliaj paĝoj |
| Augusto | SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomys IKUE E-Tendaro. En tendara frateca kaj amikeca etoso Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE . |
| 03/08 ĝis 10/08 | FORTALEZZA (Brazilo) 87-a Universala Kongreso de Esperanto. |
| 23/08 ĝis 28/08 | VERONA (Italio) 5-a Europa Kongreso de Esperanto |
| 13/09 ĝis 17/09 | LUCCA (Italio) Marina di Pietrasanta 16a Itala Katolika Kongreso "Babele-Babilonio kaj Pentekosto" |

## 55a Kongreso de IKUE - Aliĝilo

sendenda al Miloslav ŠVÁČEK, Tršická ul. 6, CZ-75127 PENČICE, Ĉeĥio

**Mi aliĝas al la 55a Kongreso de IKUE 2002 en Kroměříž, Ĉeĥio:**

Tuta nomo: S-ro, S-ino, F-ino ______________________

*Bonvolu skribi vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle*

Adreso: ______________________

______________________

Poŝtkodo: __________ Lando (en Esperanto): __________

Naskiĝdato: __________ Sekso (signu per kruceto): ina ❑, vira ❑.

Telefono: __________ Faksnumero: __________

Retadreso: ______________________

Mi deziras dividi la ĉambron kun: ______________________

Mi/ni planas alveni je *(dato kaj horo, se eblas):* __________

Mi/ni planas foriri je *(dato kaj horo, se eblas):* __________

Mi/ni planas alveturi per:

aŭtomobilo ❑, trajno ❑, buso❑, aviadilo/trajno ❑

**Loĝado:**

❑ **Mi/ni mendas en la kongresejo:**

❑ plur-litan ĉambron (du-litaj ĉambroj estas rezervitaj al geedzoj).
Ni estas geedzoj kaj petas ❑ du-litan ĉambron en la kongresejo.

❑ **Mi/ni mendas en hotelo Bouček:** ❑1-litan ĉambron, ❑2-litan ĉambron
❑ 1-litan apartamenton, ❑2-litan apartamenton

_Mi/ni ne mendas tranoktadon: ❑.

_Mi/ni mendas en la kongresejo nur manĝojn (vegetarajn oni ne preparas):
matenmanĝojn ❑, tagmanĝojn ❑, vespermanĝojn ❑

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon je temo: ______________________

Programerojn por distra vespero: ______________________

Alian programon: ______________________

***La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.***

**Pagmaniero:**

Mi pagis (sendis) la sumon de __________ je la __________

❑ al banka konto de la ĉeĥa IKUE-Sekcio (KB Přerov 194214890297/0100)
❑ per poŝtmandato
❑ perletere al s-ro Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Penčice

Dato: __________ Subskribo: __________

# MOVADAJ INFORMOJ

## PASKA PAPA BENO SUR LA PLACO DE SANKTA PETRO

Kiel ĉiujare, ankaŭ nunjare dum la paska beno de la Papo "Urbi et Orbi" - Al Urbo kaj Mondo, la Papo Johano Paŭlo la II-a salutis jam tradicie ankaŭ per esperantlingvaj vortoj: "FELIĈAN PASKON EN KRISTO RESUREKTINTA". Danke al meritplena iniciinta geedza paro Giovanni kaj Mariolina Conti el Cormano, itala urbeto apud Milano, estis bele reprezentitaj esperantistoj per bone videbla surskribo ESPERANTO (vidu bildeton).




*Dum paska dimanĉo okaze de Papa beno "Urbi et Orbi" sur la Placo de Sankta Petro en Vatikano*

## VIVU INTERESAJN TEMPOJN !

Tia estas ĉina bondeziro ,aŭ pli ekzakte : polurita malbondeziro, kiel france : Amiketo mia, tio ĉi vidigu al vi iom da ĉiuj koloroj ! Tia (bon? malbon? ) deziro efektiviĝas por ni nuntempe en tiu komenco de nova jarmilo. Ni vidas, ni spertas ŝanĝojn, surprizojn pli kaj pli spirmankajn, en nia unuiĝanta tero, malgrandiĝanta mondo, globa vilaĝo.
Jes , vole nevole, pli kaj pli rapide ni vivas en ununura mondo.Komunikiloj unue donas eblecon scii pri ĉiu nova katastrofo, akcidento, tertremo, ktp...,senprokraste, kaj aviadiloj ebligas rapide helpi viktimojn en iu ajn kontinento kaj lando.
Kiel ajn vi nomas tiun unuiĝon kaj pliproksimiĝon de ĉiuj homoj : planediĝo , tutmondiĝo aŭ globiĝo, ni jam havas ĝin ĉe ni, rapide disvolviĝantan. Tio ne

haltigeblas nek, se verdiri,haltigondas. Estas granda progreso vere homa, malgraù danĝeroj.

Sed, ĉiutage, proprokule aù televide, ni vidas ĉiam pli kaj pli larĝiĝantan disiĝon inter riĉuloj kaj malriĉuloj, en ĉiu lando, disvolviĝinta aù disvolviĝanta. Usono,Brazilo, Ĉinio montras klare tion. Tia tendenco ŝajnas la plej grava danĝero por la feliĉa komuna estonto de nia globa vilaĝo.

Ni atentu ĉefe Ĉinion, la plej grandan, la plej malnovan homan socion, kaj eble ? kulture la plej riĉan: estas 55 nacioj ĉirkaù la ĉefa Han nacio hodiaù. La Mez-Imperio absorbis kaj digestis Turkan Mongolan kaj Manĉuran invadojn kaj tiel enriĉiĝis laù jarcentoj.

Antaù nur 4 jarcentoj, granda progreso en la malkovro de Ĉinio far Okcidentaj Eùropaj landoj okazis kiam Matteo Ricci jezuita matematikisto kaj astronomo alvenis Pekinon en 1601. Li ekkonatiĝis kun tiu tre malsama civilizacio, riĉa de tre multaj spertoj dum jarcentoj kaj , en unu jardeko, tutamike kaj taksante tutsimpatie Konfuceanismon, li sukcesis fariĝi eminenta klerulo eĉ ĉina : mandarenoj kaj la Ĉina Imperiestro mem ŝatis konsulti lin pri Okcidenta scienco kaj eĉpri Ĉina kulturo.

En 2001, estis granda oficiala celebro en, Pekino por memorigi la 400an datrevenon de tiu alveno de Matteo Ricci en Pekino.

Sed en 2004, la 89-a Universala Kongreso de Esperanto okazos denove en Pekino, antaù la Olimpiaj Ludoj en 2008 . Tiuj estas gvidosignoj por ni. Ni, kristanoj, helpataj de Matteo Ricci memoru, ke ni devas esti fermento en la homa pasto, salo de la Tero dank'al Evangelio. Ni partoprenu , helpu en bona homa direkto, la konverĝon de Ĉina saĝeco, disdividota de la tuta homaro, kun Okcidenta scienco,jam disdividiĝanta inter ĉiuj nacioj.

Ĉu en la 21a jc. Ĉinio grandskale malkovros Kriston ? Ni helpu kaj vivu ĝoje interesajn tempojn .

Pastro Heroux.

La venonta eùropa renkontiĝo de la junuloj okazos en PARIZO de la 28.a de decembro 2002 ĝis la 1.a de januaro 2003 . Ĝi alvenigos pli ol dek mil gejunulojn de ĉiuj kontinentoj.

28 décembre 02 - 1er janvier 03
Paris Taizé

## Kotiztabelo 2002

<u>I.K.U.E kun "Espero Katolika"</u> — 25 eùroj

Peranto : S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL.

al kiu vi sendos ĉekon <u>je la nomo de S-ro Pons</u>

<u>A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto"</u>

| | |
|---|---|
| unuopulo | : 10 eùroj |
| geedza paro | : 13 eùroj |
| gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o | : 5 eùroj |
| bonfaranto | : 30 eùroj |

Pagu al la kasisto :S-ro VILLENEUVE G.
14,Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

al kiu vi sendos ĉekon <u>je la nomo de Association Catholique Française pour l'esperanto</u>

Dépot légal : 1er trimestre 2002 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO